

Literatura Mondo, 11-a parto:
Detala priskribo de la lingvo, lingva respondo de Kolomano Kalocsay :
Prepozicio 'da'
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 637, 1975.12.24 & 27

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

De 1922 ĝis 1934, tio estas dum la unua kaj dua periodoj de **Literatura Mondo**, monaton post monato Kolomano Kalocsay publikigis vidpunktojn pri lingvo, stilo kaj gramatiko per diskutoj kun kontraŭuloj, recenzoj kritikaj kaj eseoj.

A.- Iom post iom maturiĝis verkoj, kiujn li detalege pretigis kun Gaston Waringhien kaj aliaj kunlaborantoj. Neniam oni sufiĉe aprezos la influon de tiuj ĉi publikaĵoj. Ankoraŭ nun, eĉ se kritikojn pri ili oni legas aŭ aŭdas, neniuj libroj venis anstataŭi la **Plenan Gramatikon**.

Cl.- En respondo al Bulthuis, kiu faris demandojn pri la esperanta elparolo, Kalocsay skribis en 1931 : « *Laŭ mia opinio **praktike** la plimulto jam decidis. Oni devus sole fiksi ĉi tiun praktikon en oficialaj reguloj.* »

A.- Jen la rolo, kiun sin donis Kalocsay kaj Waringhien, ekzameni la praktikon kaj el ĝi provi eltiri regulojn. Ili provis priskribi nian lingvon ĝis la plej etaj detaloj. Ili faris pioniran laboron, kies kvaliton oni malfacile povas kritiki en kelkaj minutoj. Mi nur diros, ke Kalocsay kaj Waringhien ne ĉiam distingis la priskribon kaj la preskribon de esperanto, tio estas la fiksado de la objektiva oficiala lingvouzo kaj la personajn subjektivajn vidpunktojn. Pro tio ne ĉiuj verkistoj kaj lingvouzantoj sentis sin koncernataj de la reguloj, kiujn donis la aŭtoroj de la **Plena Gramatiko**, eĉ se ili ne kapablis kritiki tiujn ĉi regulojn.

Cl.- Por doni al vi ideon pri la ne firma gramatika situacio en 1933, antaŭ ol aperis la libro **Plena Gramatiko**, ni hodiaŭ citos artikolon de Kolomano Kalocsay, kiu titolas **Pri la prepozicio da**. Ni citas lin :

A.- « Vi demandas, kial oni diras « centon **da** pomoj », sed « tri estas duono **de** ses » (**Fundamento** paragrafo 14.)

Cl.- Nu, la tutan malcertecon pri la prepozicio **da** oni povas ĉesigi per la jena sola regulo :

A.- « Per la prepozicio **da** oni apartigas pli-malpli difinitan nombron aŭ kvanton el **nedifinita** nombro aŭ kvanto. »

Cl.- El la du supraj ekzemploj, en la unua oni apartigas centon el **nedifinita**, kvazaŭ senfina nombro da pomoj. Male, en la dua, oni apartigas la duonon el nombro severe **difinita** (ses). Do en la unua kazo oni devas uzi : **da**, en la dua ; **de**.

A.- Aliaj ekzemploj : « duono **de** pano » kaj « kilogramo **da** pano » - kial ? Ĉar en la unua kazo temas pri difinita kvanto (unu tuta sendifekta pan-unuo) ; dum en la dua kazo, la kvanto da pano, el kiu oni apartigas unu kilogramon, estas nedifinita, kvazaŭ senfina.

Cl.- Same : « duono **de** jaro », ĉar **jaro** estas difinita tempo-kvanto; sed « du kaj duono **da** jaroj », ĉar temas pri nedifinita, senfina jarnombro, el kiu oni apartigas tiujn du kaj duonon.

A.- El la supra regulo evidente sekvas la zamenhofa principo, ke oni ne uzu **da** antaŭ la difina artikolo, ĉar tiu ĉi ja signas difinitecon. Oni diru do : « Mi trinkis glason **da** ruĝa vino » (glaskvanton el nedifinita, kvazaŭ senfina kvanto de ruĝa vino), sed « mi trinkis glason el la ruĝa vino, kiun vi sendis » (glaskvanton el strikte difinita kvanto da ruĝa vino). Same : « grupo **da** soldatoj » (grupo el nedifinita, senfina soldat-nombro), sed « grupo de la kondamnitoj » (ĉar la kondamnitoj, pri kiuj temas, havis certe difinitan nombron).

Cl.- Kompreneble, same oni ne povas uzi **da** antaŭ **tiu**, **ĉiu**, **tiuj**, **ĉiuj**, posedaj pronomoj kaj numeraloj, ĉar ja ĉiuj ĉi havas difinan funkcion.

A.- Kaj nun vi eble klare rekonos, kial estas malĝustaj : « vojo da tri horoj », « laboro da kvin jaroj. » Oni devas diri : « vojo de tri horoj », « laboro de kvin jaroj », aŭ « tri horoj da vojo », « kvin jaroj da laboro ».

Cl.- Nun sekvas la demando, ĉu oni povas uzi **da** antaŭ **personaj pronomoj** ? Nu, plej ofte ne, ĉar ĉi tiuj pronomoj preskaŭ ĉiam rilatas al difinita kvanto au nombro. Oni do diru : « mi ricevis la tutan monon, mi ricevis nur iom el ĝi » (ne « iom da ĝi »). Same : « multaj el ni », « kelkaj el vi », « dekduo el ili ». Plej bone estas tute eviti la uzon de **da** antaŭ persona pronomo.

A.- Sed aliflanke, Zamenhof estis prava pri tio, ke ĉi tiu malpermeso tamen ne estas nepra: oni povas uzi **da**, se la persona pronomo rilatas al nedifinita kvanto. Ekzemple : « Ŝi bezonas monon, bezonas multe da ĝi. » Sed tiaj okazoj, kiel diras ankaŭ Walter Lippmann, estas vere maloftaj.

Cl.- Kiel ni vidis, daŭrigas Kalocsay, ĉe la uzo de **da** decidas ne la kvanto apartigota, sed la kvanto, el kiu oni apartigas. Dum la nedifiniteco de ĉi lasta estas nepra postulo por la uzo de **da**, la difiniteco de la apartigota kvanto estas pli larĝe konsiderebla. Ne nur **multe**, **kelke**, **iom**, **aro**, **trupo**, **amaso** ktp estas rigardeblaj kiel « pli-malpli difinitaj » mezuroj, sed oni povas diri ankaŭ « laĉo da koraletoj », « nubo da korvoj », « torento da lumo », « maro da mizero » ktp. »

A.- Kalocsay konkludas sian artikolon per tiu ĉi lasta klarigo: « Mi volas ankoraŭ atentigi pri la nuanc-diferenco, kiu ekzistas inter **da** kaj **de**. Per **da** ni akcentas la mezuron, kvanton, nombron, per **de** ni akcentas la **kvaliton** de la objektoj aŭ individuoj, el kiuj ni apartigas. « Grupo **da** soldatoj akcentas, ke temas pri **grupo** (ne pri unu, aŭ du, aŭ kelkaj) ; grupo **de** soldatoj akcentas, ke temas pri **soldatoj**. »

Cl.- Centoj da tiaj lingvaj respondoj kondukis Esperanton al ties gramatika maturiĝo, kaj neniam ni sufiĉe memorigos la rolon de Kolomano Kalocsay.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!